



# TEA-BULTENO

3<sup>a</sup> JARO

DECEMBRO 2000

NUMERO 12



## AGENDO



- 1 V Kartluda vespero
- 2 S
- 3 D
- 4 L
- 5 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 6 M
- 7 Ĵ
- 8 V Sidejo fermita
- 9 S
- 10 D ZAMENHOF-TAGO EN VERONO
- 11 L 
- 12 M Ordigo de TEA-arkivo
- 13 M
- 14 Ĵ
- 15 V KRISTANA KAJ JUDA VERSIOJ DE ISLAMA LEGENDO
- 16 S
- 17 D ZAMENHOF-TAGO EN TRIESTO
- 18 L 
- 19 M Ordigo de TEA-arkivo
- 20 M
- 21 Ĵ
- 22 V KRISTNASKA FESTO 
- 23 S
- 24 D 
- 25 L
- 26 M
- 27 M
- 28 Ĵ
- 29 V JARMILFINA AŬKCIO KAJ FESTO!!! 
- 30 S
- 31 D

## Zamenhofa Tago en Triesto

Dimanĉon la 17<sup>an</sup> de decembro 2000

Laŭ nia tradicio ankaŭ ĉijare, okaze de la datreveno de naskiĝtago, ni honoru nian Majstron, kiel eta dank-esprimo pro lia grandioza donaco farita al la tuta homaro.

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO proponas al vi la ĉi suban programon kaj varmamike invitas al nombra partopreno.

h. 10.00 Rendevuo antaŭ la Palaco *Morpurgo* (Sidejo de la Ŝtata Biblioteko - *Largo Papa Giovanni XXIII, 6*), por vizito de la ekspozicio:

ELIZABETO EL AŬSTRIO, TRIESTO KAJ ITALIO (senpaga eniro)

h. 13.00 Tagmanĝo ĉe TEA-sidejo:

**3<sup>A</sup> GASTRONOMIA KONKURSO!**

h. 15.00 Memore al Lazaro Ludoviko Zamenhof Kristnaskaj kantoj fare de la virina koruso IVAN GRBEC

Jes, denove **GASTRONOMIA KONKURSO**: ni ŝatas batalon inter kuiristoj, armitaj per kuleregoj, kaseroloj, patoj... ĉar poste oni gustumos frandaĵojn!!! Temos pri la 3<sup>a</sup> kulinara konkurso organizita de TEA, kaj jam la 2<sup>a</sup> en la jaro 2000. Ĉiu ajn rajtas en ĝi partopreni, sendepende de sekso, raso, lingvo, religio, vegetarismo aŭ ne: ni - la ĵurianoj!!! - pretas, tute senantaŭjuĝe kaj sendiskriminacie, gustumi ĉiun ajn preparitan pladon, kondiĉe ke ĝiaj ĉefroluloj estu



## LA FAZEOLOJ

### Regularo de la

### 3<sup>A</sup> GASTRONOMIA KONKURSO



La partoprenantoj en la konkurso devas pretigi pladon kies protagonisto estu la **fazeolo**: ne gravas ĉu blanka, ĉu nigra, ĉu ruĝa - tio estu laŭ propra prefero. La aliaj ingrediencoj povas esti viandaj, fiŝaj, legomaj, vegetaĵaj ktp. Dolĉaĵoj estos bonvenaj, sed - atentu! - eksterkonkursaj! Tiuj kiuj deziras proponi sian frandaĵon al severa juĝantaro, devas anonci sin, ĝis la 15<sup>a</sup> de decembro, al TEA-sekretario.

Kiuj estos la juĝantoj? Ĉiuj, kaj la konkursantoj mem kaj la simplaj "manĝantoj". Sur apartaj, disdonotaj, slipoj oni atribuos la poentojn al la plej ŝatata manĝo. Al ĉiu plado oni povas doni de nulo ĝis dek poentoj, kaj fine venkos la unuaj tri kiuj ricevos la plej nombrajn voĉojn. Ĉu necesas aldoni ke interesajn premiojn gajnos la sukcesantoj?

Partoprenkotizo: NUR po L. 3.000.

Nepras tamen, por sukcesa aranĝo, antaŭanonci sin ĉe TEA-sekretario, kaj por la vizito kaj por la tagmanĝo. Pliaj informoj kaj nepraj antaŭmendoj ĉe TEA-sekretario, ĉiu-marde kaj -vendrede - h. 19.30-22.00 - 040 763128 aŭ, en la aliaj tagoj, ĉe Elda: 040 763244.

## Zamĝnhofa tago 2000 ĝn Verono

La ĉiujara renkontiĝo de esperantistoj ĉe la stacidomo de Verona PN, per la organizo de FERVOJISTA ESPERANTO-GRUPO, okazos dimanĉon la 10<sup>an</sup> de Decembro 2000. Prof-ro Carlo Minnaja prelegos pri la temo:

Unuaj literaturaj groj ĝn Esperanto (1887-1900)  
Kiel en la pasintaj jaroj, la programo antaŭvidos intervenojn de la partoprenantoj, libroservon, tagmanĝon ĉe la najbara fervoja restoracio, ktp. La oficiala malfermo estos je la 9.30, post kiu, laŭ la regularo, en la renkontejo oni parolos nur Esperante.

*Informis Enrico Molesini <molesini@tin.it>*

*Unu el la ĉefpunktoj, pri kiu ni konstante devas atenti, estas informada agado. Tion oni povas fari profesiece aŭ amatorece, konsiderante tamen ke fuŝe farita informado povas endanĝerigi multjaran, antaŭe faritan, agadon, eĉ kun risko prezenti nian aferon kiel fantaziaĵon, stultan utopion de malaktualaj stranguloj. Por konkrete kontribui al plibonigo kaj plimodernigo de ĝenerala informado, oni serioze preparis iun taŭĝan instru-normaron por ĉiuj movadaj aktivulaj grupoj, kiu nun estas je ĉies dispono. Ni aŭskultu la konsilojn, pri ili ni interdiskutu, kaj - se eble - ilin apliku, laŭ propra loka cirkonstancaro. Longa vojo staras antaŭ ni: do, ni ne perdu tempon kaj fariĝu pli profesiecaj, ĉar en nuna mondo estas malpermesate postresti, esti eternaj naivuloj, atendi el la ĉielo ian miraklon - ni mem estu kuraĝaj kaj eliru eksteren, alfrontante la publikon per konvinka, konkreta, nesterila argumentado, ĉar nia lingvo meritas seriozan prezentadon, pro ĝiaj, dum pli ol unu jarcento jam pruvitaj, efikeco kaj vivpoveco en ĉiu kampo de la homa medio.*

## GAZETARA KOMUNIKO DE UEA - N° 100

Post pli ol unujara preparado ricevis sian finan formon GVIDLINIOJ POR INFORMADO PRI ESPERANTO. Laborgrupo de la Komitato de UEA diskutis pri ĝi unuafoje en la Berlina UK. En Tel-Avivo la Komitato aprobis la novan dokumenton, rajtigante estraranon pri informado, Kalle Kniivilä, zorgi pri ĝia redakta finpoluro. La oficiala publikigo okazis en la oktobra numero de ESPERANTO kaj en Gazetaraj Komunikoj de UEA. Al ĉi-lastata la lanĉo de la nova dokumento estas aparte konvena maniero festi sian 100<sup>an</sup> numeron.

En la rubriko MALFERME de la oktobra ESPERANTO Kalle Kniivilä skribas pri la fono kaj celoj de la GVIDLINIOJ. Li memorigas pri la "Principaro de Frostavallen" el 1956: «La ĉefa konkludo de tiu baza dokumento pri informado ne perdis sian aktualecon. Por sukcesa informado necesas profundaj konoj kaj klara konscio pri la valoro de la fenomeno Esperanto. Nur per sufiĉaj scioj oni povas kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Tial la unua tasko de informanto estas informi sin mem, kaj tiu lernado neniam ĉesas.»

Kompare kun la "Principaro de Frostavallen", la GVIDLINIOJ ne enhavas liston de ĉefaj eraroj nek instrukciojn pri insinoj kaj vestaĵoj. Kniivilä klarigas, ke pozitiva instigo pli inspiras al sukcesa informado ol listo de malpermesoj. «La Esperanto-movado ne plu estas movado de stranguloj, kiujn oni devas admoni al deca konduto.» La GVIDLINIOJ estas ankaŭ bonega diskutmaterialo por kluboj, progresigaj kursoj kaj Esperanto-aranĝoj.

## GVIDLINIOJ POR INFORMADO PRI ESPERANTO

### ► Celoj

- Konsciigi la publikon pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo.

Ĉia informado pri Esperanto estas senperspektiva, se la celgrupo ne konscias pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj la nedemokratieco de la nuna internacia lingva ordo. La unua celo de la informado devas sekve esti, ke la ĝenerala publiko malkovru la fundamentan nedemokratiecon de komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn sed postulas de aliaj jarojn da penoj por atingi tamen malperfektan lingvoscion. En la strebado estigi diskuton pri lingva egaleco kaj lingvaj rajtoj troveblas multaj potencialaj aliancanoj kun similaj celoj. Ekzistas multaj sciencaj verkoj pri la efikoj de lingva neegaleco je tutmonda, loka kaj individua niveloj. Indas, ke respondeculoj pri informado bone trastudu la temon. Por ŝanĝi la realaĵojn necesas unue ĝisfunde ekkoni ilin.

- Konsciigi la publikon pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto.

Esperanto estas unika fenomeno, kaj antaŭ ĉio necesas, ke la esperantistoj mem plene konsciu pri tio. Ĉiu esperantisto povas rakonti pri personaj spertoj kiuj ofte estas tute neimageblaj al eksteruloj. Konkretaj spertoj kaj veraj homoj el foraj landoj estas la plej konvinka rimedo por atentigi la publikon pri la ekzisto de tiu fenomeno. Gravus ja ke la informado ne estu tro abstrakta: imponi povas personaj riĉiĝoj pere de Esperanto, emociaj kaj intelektaj. Informado pri Esperanto devas unuavice esti ĝuste informado, ne propagando. En informado ĉefan rolon havu veraj informoj, ne sloganoj ("Lingvo de paco kaj amikeco", "ĉies dua lingvo" ktp). Ne ĉiu volas lerni Esperanton, sed multo estas atingita, se oni sukcesas konsciigi pli vastan publikon pri tio, ke Esperanto estas vera vivanta lingvo kun parolkomunumo kiu ampleksas la tutan mondon, lingvokomunumo en kiu ĉiu ano povas senti sin plenrajta membro. Jam tio estas revelacio por la plej multaj homoj. Por efike informi pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto necesas, ke la esperantistoj mem pli profunde konu la fenomenon Esperanto, kaj sekve pli kuraĝe argumentu kontraŭ eraraj prezentoj.

- Proponi Esperanton kiel solvon en konkretaj situacioj.

Nur post kiam la unuaj du celoj estas almenaŭ parte atingitaj, eblas serioze proponi uzon de Esperanto kiel solvon en iuj konkretaj situacioj. Necesas ĉiam konscii ke Esperanto ne estas magia bastoneto, kiu per unu frapo povus forigi ĉiujn problemojn de lingva neegaleco. Antaŭ ol proponi Esperanton en konkreta situacio, necesas ĝisfunde pripensi, kiun precizan rolon Esperanto povus havi, kiaj estus la avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kaj kiaj estos la argumentoj de la kontraŭuloj. Sed en kazoj kie la avantaĝoj estas klaraj kaj la kontraŭargumentoj facile refuteblaj, oni kuraĝe faru sian proponon, aŭ, se eble,

simple ekuzu Esperanton.

- Kuraĝigi al lernado de Esperanto.

Lerni Esperanton volos unuavice homoj kiuj konscias pri la problemoj en la nuntempa internacia lingva ordo aŭ sentas sin altirataj de la tutmonda egaleca lingvokomunumo de la Esperanto-parolantoj. Sekve la plej bona maniero varbi kursanojn estas konscii la publikon pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj pri la ekzisto de tutmonda, egalece funkcianta, lingvokomunumo, en kiu ĉiuj bonvenas. Malmultaj deziros eklerni Esperanton nur pro tio ke ĝi estas relative facila lingvo. Ne la gramatikaj detaloj sed la fakto ke ĉiu povas igi Esperanton sia propra lingvo, igas ĝin unika kaj lerninda.

#### ► Rimedo

**Je la nivelo de UEA - Unuavicaj celgrupoj:** Landaj Asocioj de UEA; internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj; organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; la informita ĝenerala publiko tutmonde, sed aparte en landoj, kie ne ekzistas organizita Esperantomovado.

**Taskoj:** Gvidado de la informa agado je landa nivelo; kontaktoj kun internaciaj organizaĵoj kaj laŭeble informado rekte al la monda publiko; ĝenerala informado en regionoj sen organizita movado.

Por subteni la informan agadon je landa nivelo, la Informa Fako de UEA strebu regule disponigi al la Landaj Asocioj gazetarajn komunikojn kaj pretajn modelajn artikolojn facile tradukeblajn kaj adapteblajn al lokaj cirkonstancoj. UEA ankaŭ strebu disponigi en siaj interretaj paĝoj koncizajn respondojn al oftaj demandoj pri Esperanto kaj kolekton de modelaj informiloj diverslingvaj.

**Ĉe internaciaj organizaĵoj** ĝi unuavice flegu la rilatojn, informu pri la esperantista agado kiu konformas kun la celoj de la koncernaj organizaĵoj, kaj tiel montru la utilon de pluj kaj pliaj kontaktoj por ambaŭ partioj. UEA ankaŭ laŭeble strebu konscii respondeculojn de la organizaĵoj pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo, sed tiuj strebadoj ne malutilu al la bonaj rilatoj kun la koncernaj organizaĵoj. UEA aktive serĉu kontakton kun medioj, kie oni diskutas problemojn rilatajn al lingva egaleco kaj tutmonda komunikado, kaj senpasia informu pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto.

#### Je la nivelo de Landaj Asocioj

**Unuavicaj celgrupoj:** Lokaj grupoj kaj individuaj membroj de la Asocio; landnivele aŭ internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj; naciaj aŭ lokaj organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; ĵurnalistoj de tutlandaj amaskomunikiloj kaj la ĝenerala informita publiko.

**Taskoj:** La ĉefa respondeco pri informa laboro kuŝas ĉe la nacia nivelo. La Landa Asocio provizu la lokajn grupojn kaj la individuajn membrojn per aktuala kaj profesie produktita inform-materialo, starigu rebat-servon kiu rapide reagu al eraraj prezentoj de Esperanto en tutlandaj kaj lokaj amaskomunikiloj, kaj ĝi aktive kontaktu organizaĵojn kaj individuojn kiuj povas interesiĝi pri egaleca tutmonda komunikado.

#### Je loka kaj individua nivelo

**Unuavicaj celgrupoj:** Lokaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj, ĵurnalistoj de lokaj

amaskomunikiloj kaj la ĝenerala publiko.

**Taskoj:** Informado pri konkretaj aranĝoj, kontaktoj kun lokaj ĵurnalistoj.

La individuaj esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la valoro de la fenomeno Esperanto, kaj ili havu sufiĉajn sciojn por kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Pli gravas la kvalito ol la kvanto de la informado.

Inf. CO de UEA

### La homa cerbo preferas la italan, ne la anglan

Oni daŭrigas diri, ke la angla estas pli rapida, pli sinteza, pli taŭga al la komunikado ol la itala, lingvo kompleksa kaj multevorta. Ĉio veras. Sed la aferoj inversiĝas se oni konsideras la lernotempon: al la italaj infanoj necesas malpli da tempo ol la samaĝaj angloj por lerni kaj legi sian lingvon.

La malkovron faris esploristoj de la hospitalo *SAN RAFFAELA* de Milano, gvidataj de prof-ro Ferruccio Fazio kunlabore kun kolegoj de Londona UNIVERSITY COLLEGE. La rezultojn oni publikigis en la faka bulteno *NATURE NEUROSCIENCE*. La diferenco kuŝas en la fakto, ke, pri legado, en la itala la literoj rilatas al sonoj laŭ unusenca maniero, dum en la angla necesas uzi aldonajn informojn, same kiel la vortsignifon antaŭ ol ĝin prononci.

La esploristoj utiligis, per tomografio, la elementajn pozitronojn por kalkuli la cerban fluon en italoj kaj angloj legantaj en sia propra lingvo. Oni vidis, ke ne funkcias la samaj cerbaj zonoj: legi anglan vorton, post la serĉado de la ĝusta senco, pli penigas ol legado de itala vorto.

Ankaŭ en Esperanto la prononco ne varias laŭ la variado, tute neekzistanta, de sencoj. Ĉu la nova esploro pliigos la estimon al Esperanto?

## Konkursoj!!!!

... el Francio

### Konkurso de infan-desegnaĵoj

*Temo: Pri kio/kiu vi revas?*

Ĉiuj instruistoj estas varme petataj inviti sian lernantaron partopreni en ĉi tiu konkurso per desegnaĵoj.

Organizanto: ESPERANTO EN VENDOMOIS

Les Monts, FR-41360 LUNAY

Ret-adreso: [esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr](mailto:esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr)

Konkursa regularo: Formato - minimume 40cm x 30cm

A: ĝis 7 jaroj

Kategorioj B: pli ol 7 ĝis 10 jaroj

C: pli ol 10 ĝis 14 jaroj

Limdato: 25<sup>a</sup> de majo 2001

Dorse de la desegnaĵoj, notu nomon kaj aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ Esperanto-Klubo kaj koncizan priskribon de la verko.

La premioj estos atribuitaj po 3 en ĉiu kategorio. Ĉiu infano ricevos partoprenan diplomon. Libroj, kasedoj, KD, T-ĉemizoj, k.a. konsistigos la premiojn.

Por kromaj informoj, vizitu la retpaĝojn:

<http://www.esperantoenvendomois.fr>



kaj ... el **Meksiko!**

## Konkurso de Take

*Temo: Kiel mi vidas mian landon*

Inter la tre diversaj programeroj de la 5<sup>a</sup> TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO - TAKE, estos la **Konkurso de Belarto por infanoj kaj junuloj**. LKK-ano Mike Porter petas subtenon kaj kunlaboron de la tuta esperantistaro por ties sukceso. Demandojn pri ĝi aŭ ĝenerale pri TAKE, postkongresa ekskurso, ka, oni povas sendi al li rete: mike@math.cinvestav.mx aŭ poŝte al MEF.

**MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO** invitas ĉiujn infanojn kaj gejunulojn (esperantistojn kaj gefilojn de esperantistoj), partopreni en la konkurso pri desegnado kaj pentrado, okaze de ĉi tiu tre grava renkontiĝo, realigota en Meksikurbo de la 15<sup>a</sup> ĝis la 21<sup>a</sup> de aprilo 2001.

La interesatoj povas partopreni per desegnaĵo aŭ pentraĵo laŭ iu ajn tekniko, ne tridimensia, en mezuro maksimume 40 x 55 cm, en unu el la tri sekvaj kategorioj:

a) 4 ĝis 9-jaruloj, b) 10- ĝis 14-jaruloj, c) 15- ĝis 18-jaruloj. Dorse de la verko devas esti klare notitaj la sekvaj informoj: kompleta nomo de la aŭtoro, adreso, naskiĝdato, titolo kaj tekniko. **Limdato:** la 5<sup>a</sup> de Marto 2001. Estos aljuĝita po unu premio al ĉiu el la tri kategorioj a), b), kaj c), kiu konsistas el meksika artaĵo. Cetere, estos aljuĝitaj du premioj **HONORA MENCIO** en ĉiu kategorio. Ĉiu konkursaĵo ricevita fariĝos parto de la kolekto de MEF. La konkursaĵon oni sendu volvita, ne faldita, al la sekva adreso:

**MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO**

Relaciones Exteriores No. 24 - Colonia Federal  
MX-15700 Mexico, D.F. MEKSIKIO

## Thorsen-apogo al 15 Bibliotekoj

UEA disdonis por la kvara fojo subvenciojn de la Biblioteka Apogo **ROMA KAJ POUL THORSEN**. Rekorda nombro de 28 Esperantobibliotekoj el 21 landoj sendis peton. La juĝkomisiono povis ĝojigi 15 bibliotekojn, inter kiuj estis dividita la sumo de 1800 eŭroj.

La subvencion ricevis:

- \* Kataluna Esperanto-Asocio kaj Vjetnama Esperanto-Asocio (po € 250);
- \* Bonaera Esperanto-Asocio, Argentino, Esperanto-Biblioteko **NOVAJ HORIZONTOJ**, Kolombio; Ĉengdu-a Esperanto-Asocio, Ĉinio; Esperanto-Societo **LA PROGRESO**, Prilep, Makedonio (po € 150);
- \* Korea Esperanto-Asocio; Esperanto-Societo **BUDE BORJAN**, Zagrebo, Kroatio; Malta Esperanto-Societo (po € 100);
- \* Kultura Esperanto-Centro de Angevin kaj Esperanto-Kulturcentro de Tuluzo, Francio; Esperanto-Muzeo **LAJOS GYULA**, Pecs, Hungario; Animada Klubo de Esperanto, Zambio (po € 75);
- \* Bulgara Esperanto-Asocio kaj Lipecka Esperanto-Klubo **REVO**, Rusio (po € 50).

Ekde la unua aljuĝo en 1997 ĝis nun, entute 43 Esperanto-bibliotekoj povis pligrandigi siajn kolektojn per subvencio de la Biblioteka Apogo. Pro la multeco de la petintoj la subvencio ankoraŭ ne estis asignita dufoje al sama biblioteko.

Petoj por la aljuĝo en 2001 devos atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15<sup>a</sup> de oktobro 2001. Ilin akompanu listo de dezirataj libroj, ordigitaj laŭ prefero, ĉar la subvenciojn oni ricevas ne kiel monon sed kiel librojn. Konsiderataj estas nur bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ekstermovada instanco.

## 70<sup>a</sup> Itala Kongreso de Esperanto Trieste, 28 julio - 1 aŭgusto 2001

**KONGRESA TEMO:**

**EŬROPO 2001: KULTUROJ - LINGVOJ - ESPERANTO**

Proksimiĝas la festotagoj: belaj momentoj kiujn oni pasigas varmetose kune kun familianoj kaj geamikoj, tradicia okazo por interŝanĝi donacojn, reciproki ĝentilaĵojn, plezurigi la karulojn. Ho, kia problemo serĉi nuntempe taŭgan donacon! Ĉiu ja havas ĉion! Nu, ni sugestas al vi jenon: donaci aliĝkotizon por la Itala Kongreso! Pripensinda, ĉu ne? Do, ni estas je via dispono kaj plie memorigas ke la 2<sup>a</sup> malplikosta aliĝperiodo daŭros ĝis la fino de januaro 2001. Se vi jam decidis pri partopreno, rapidu ĉar, tute nerimarkite, tempo fulme forflugas kaj...



### KRISTNASKA FESTO

**Vendredon la 22<sup>am</sup> de decembro**, vi estas varme invitataj ĉe TEA-sidejo por amika kuntostado. Ankaŭ ĉijare Kristnaska Paĉjo vizitos nin por persone transdoni kelkajn donacetojn. Do, vi estas atentataj ekde la 20<sup>a</sup> horo.



### JARMILFINA AŬKCIO

**Vendredon la 29<sup>am</sup> de decembro**, ni kune festos por adiaŭi la forirantan jaron kaj bonvenigi la 21<sup>am</sup> jarcenton kaj la 3<sup>am</sup> jarmilon. Jes, estos ankaŭ tostado sed - plej interese - eksterordinara aŭkcio, dum kiu eblos havigi al si nekredablajn, ne plu troveblajn, neimageblajn objektojn. Kion? Ho ne, mi tute ne povas malkaŝi kion: venu, venu, estos multaj surprizoj!!! Ekde la 20a horo, kompreneble!

Ĉu vi memoras pri la belaj, buntaj, spritaj, bildkartoj desegnitaj de nia amiko-grafikisto *Eraldo Sepulcri*? Unu el tiuj estis eĉ publikigita, pasintjare, kovrilpaĝe de **ESPERANTO**, organo de UEA. Nun estas la momento por sendi ilin al niaj amikoj tra la mondo: pri kostoj, rabatoj ks informas TEA-kasisto. Krome por propagandi la italan kongreson, disponeblas tiutemaj poŝtkartoj kaj glumarkoj.

*Kristnaskaj kaj Novjaraj Bondezirkartoj*

**Grave! Grave! Dimanĉon la 14<sup>am</sup> de januaro 2001 okazos la Ĝenerala Jarasembleo de TEA.**

**Pluraj artikoloj fontas el RET-INFO**

**BULTENO** de la membroj de  
**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**

**Sidejo:** Via Crispi 43 - 34125 Trieste  
tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperanto@retecevica.trieste.it; nored@tiscalinet.it

**Poŝta adreso:** CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio  
Poŝtĉekkonto N° 10834349